

3 November 2021

[Esperanto-traduko sube]

Remarks at Cambridge University Honorary Degree Ceremony

António Guterres

Chancellor,
Vice Chancellor,
Academics,
Students,
Civic leaders,
Ladies and Gentlemen,

Thank you for this great honour.

I know that through me, you are recognizing the work of my United Nations colleagues around the world.

Cambridge has enduring links with global governance and the United Nations, from John Maynard Keynes, who played such an important role in establishing international economic institutions after the Second World War, to Margaret Anstee, the first woman to be appointed Assistant Secretary-General.

The contributions of Cambridge's scientists and mathematicians to global learning are unparalleled.

Isaac Newton, Charles Darwin, Rosalind Franklin, Alan Turing and Jane Goodall are just a few of the global giants and pioneers educated here.

It is clear that Cambridge students do not only learn. They learn how to learn, how to think for themselves and harness their intellectual curiosity for the common good.

Or as John Milton, who graduated from this university nearly 400 years ago, put it: "Give me the liberty to know, to utter, and to argue freely according to conscience, above all liberties."

Ladies and gentlemen,

We need that Cambridge spirit today more than ever.

I have just arrived from COP26 in Glasgow, the focal point of global efforts to avoid the worst impacts of the climate crisis.

Cambridge University is at the forefront of efforts to tackle these crises, through Cambridge Zero and the Cambridge Conservation Initiative.

And the Cambridge Institute for Sustainability Leadership is demonstrating that academia and the corporate sector can work together to drive transformative change.

Ladies and gentlemen,

Beyond our war on nature, we face a crisis in the values on which the United Nations was founded 76 years ago: trust, solidarity, truth.

Levels of inequality are breathtaking. Billionaires are competing in outer space while millions struggle to survive here on earth.

Poverty and hunger are rising for the first time in decades.

Human rights are under fire.

Geopolitical divisions threaten to paralyze international cooperation.

Unregulated technologies present enormous new risks.

Trust between people and institutions is fraying. Conspiracy theories and disinformation are fueling social divisions and polarization.

The COVID-19 pandemic has exposed a world of fragilities and injustice.

A world of winner takes all; and devil take the hindmost.

Scientists, including here in Cambridge, succeeded in understanding the virus and its mutations through genomic sequencing, and developed vaccines in record time.

But grossly unequal access to those vaccines means that less than five percent of people have received even one dose in low-income countries.

This is not just immoral; it's stupid, because it increases the risk of new and more dangerous variants.

And lopsided vaccination rates are creating a lopsided recovery, which will ultimately cost trillions to the entire global economy.

The same selfish short-termism is apparent far beyond the pandemic, in global approaches to nuclear disarmament, artificial intelligence, the regulation of new technologies, and many other areas.

Global governance is at a crossroads.

Either we work together with renewed solidarity to build sustainable, inclusive societies and economies, based on human rights and human dignity for all.

Or we resign ourselves to a future of perpetual insecurity and crisis.

Ladies and gentlemen, dear students,

In response to these disturbing global trends, the United Nations has embarked on Our Common Agenda, an initiative to strengthen multilateralism and make it fit for the 21st century.

Our Common Agenda includes more than 90 recommendations grouped around four broad themes.

First, there is an emphasis on the long-term thinking and solidarity with future generations.

A Summit of the Future will explore ways to strengthen the governance of global public goods including peace, global health, a livable planet, and digital technology.

Second, Our Common Agenda proposes a renewed social contract for the 21st century, anchored in human rights. This must include universal health coverage, income protection, housing, decent work, and access to education and training.

This will only be possible for all countries through a New Global Deal, that ensures the developing world gets the support it needs from developed countries and international financial institutions.

Third, Our Common Agenda will bring a strong focus to facts and science. I will re-establish an Advisory Board of Scientists and establish a UN Futures Lab to strengthen the role of the United Nations as a reliable source of data and evidence.

As part of this emphasis on facts, Our Common Agenda proposes that governments, media outlets and regulatory bodies should work together on standards for integrity in public debate.

In short, we must make lying wrong again.

And fourth, the United Nations of the future must be more inclusive and networked than ever before.

When the United Nations was created, multilateralism meant governments working together towards common goals.

Today, those with global influence encompass civil society, the private sector, cities and regional authorities, academia and more.

Universities hold many of the solutions we need. Not only climate scientists and pharmacologists, but sociologists, lawyers, economists and experts in every discipline are researching ideas that can lead to breakthroughs for the common good.

Many of the next steps in implementing this ambitious agenda now lie with our Member States. And those Member States represent you.

I urge everyone with an interest in these issues – and that means everyone – to make your views known, through the ballot box and through civil society organizations, including the very active United Nations Associations here in Cambridge and at the UK national level.

Ladies and gentlemen, dear faculty and students,

Values, principles, truth and integrity are at the heart of the liberal education that Cambridge has offered the world for 800 years.

Scientific research and cutting-edge technology are nothing without them.

We need institutions dedicated to learning, not profit;

To critical thinking, not power;

To pushing the boundaries of human understanding;

To discovery and wonder;

To facts and science.

We need institutions like Cambridge. Thank you.

03 Novembro 2021

Rimarkoj ĉe la Universitato de Kembriĝo okaze de akcepto de honora doktoreco

António Guterres

Kanceliero,
Vickanceliero,
Profesoroj,
Studentoj,
Urbaj gvidantoj,
Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Dankon pro la nuna granda honoro.

Mi scias, ke, pere de mi, vi rekonas la laboron de miaj kolegoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj diversloke ĉirkaŭ la mondo.

Kembriĝo havas longjarajn ligojn kun monda gvidado kaj Unuiĝintaj Nacioj, ekde John Maynard Keynes, kiu ludis tiel gravan rolon en starigo de internaciaj ekonomiaj institucioj post la Dua Mondmilito, ĝis Margaret Anstee, la unua virino nomita kiel Asista Ĝenerala Sekretario.

La kontribuoj de la sciencistoj kaj matematikistoj de Kembriĝo al monda klero estas sen paraleloj.

Isaac Newton, Charles Darwin, Rosalind Franklin, Alan Turing kaj Jane Goodall estas nur kelkaj el la terglobaj gigantoj kaj pioniroj, kiuj edukigis tie ĉi.

Estas klare, ke studentoj de Kembriĝo ne nur lernas. Ili lernas kiel lerni, kiel pensi por si mem, kaj kiel jungi sian intelektan scivolon por la komuna bono.

Kiel John Milton, kiu diplomiĝis de tiu ĉi universitato antaŭ preskaŭ kvarcent jaroj, sin esprimis: “Donu al mi la liberecon scii, eldiri, kaj senlime argumenti laŭ mia konscienco, super ĉiuj aliaj liberecoj.”

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Pli ol iam ajn antaŭe ni bezonas la kembriĝan spiriton.

Mi ĵus alvenis el la klimatkonferenco COP26 en Glasgovo, la fokusopunkto de tutmondaj klopodoj por eviti la plej malbonajn efikojn de la klimata krizo.

La Kembriĝa Universitato avangardas en la iniciatoj por fronti tiujn krizojn, per Cambridge Zero kaj la Kembriĝa Konservada Iniciato (Cambridge Conservation Initiative).

Kaj la Kembriĝa Instituto por Gvidado pri Daŭripoveco (Cambridge Institute for Sustainability Leadership) montras, ke la universitata mondo kaj la entreprena sektoro kapablas kunlabori por motori transforman ŝanĝiĝon.

Sinjorinoj kaj sinjoroj,

Preter nia milito kontraŭ naturo, ni frontas krizon en la valoroj sur kiujn Unuiĝintaj Nacioj estis fondita antaŭ 76 jaroj: konfido, solidaro, vero.

Niveletoj de neegaleco estas spirhaltigaj. Miliarduloj konkurencas en la fora spaco dum milionoj da homoj luktas ĉi-tere por entute transvivi.

Malriĉo kaj malsato kreskas por la unua fojo en jardekoj.

Homaj rajtoj estas sub pripafado.

Geopolitikaj dividoj minacas paralizi internacian kunlaboron.

Nereguligitaj teknologioj prezentas grandegajn novajn riskojn.

Konfido inter homoj kaj institucioj forfrotiĝas. Konspiraj teorioj kaj misinformado hejtas sociajn dividojn kaj polusiĝon.

La pandemio KOVIM-19 elmontris tutan mondon de fragilecoj kaj maljusteco.

Temas pri mondo kie la venkinto prenas ĉion, dum la diablo prenas la postrestantojn.

Sciencistoj, ankaŭ tie ĉi en Kembriĝo, sukcesis ekkompreni la viruson kaj ĝiajn mutaciojn per genoma sinsekvado, kaj evoluigis vakcinojn en rekorde mallonga tempo.

Sed ege malegala aliro al tiuj vakcinoj signifas, ke malpli ol kvin procentoj de la homoj ricevis eĉ unu dozon en malaltenspezaj landoj.

Tiu ĉi situacio estas ne nur malmorala: ĝi stultas, ĉar ĝi altigas la riskon de novaj pli danĝeraj variantoj.

La malekvilibraj ritmoj de vakcinado kreas malekvilibran renormaliĝon, kio finfine kostos trilionojn al la tuta tergloba ekonomio.

La sama egoisma tujismo evidentas tute preter la pandemio, en mondaj aliroj al nuklea malarmado, artefarita inteligento, reguligo de novaj teknologioj, kaj sur multaj aliaj terenoj.

Tergloba mastrumado venis al vojkruciĝo.

Aŭ ni laboru kune, kun renovigita solidareco, por konstrui daŭripovajn, inkluzivajn sociojn kaj ekonomiojn, bazitajn je homaj rajtoj kaj homa digno por ĉiuj.

Aŭ ni simple rezignu nin al estonteco de konstantaj malsekuro kaj krizado.

Sinjorinoj, sinjoroj, karaj studentoj,

Responde al tiuj maltrankviligaj tutmondaj emoj, Unuiĝintaj Nacioj lanĉis Nian Komunan Tagordon, iniciaton por plifortigi multflankismon kaj tajli ĝin al la 21-a jarcento.

Nia Komuna Tagordo enhavas pli ol 90 rekomendojn grupigitajn laŭ kvar larĝaj temoj.

Unue, oni emfazas longdaŭran pensadon kaj solidarecon kun venontaj generacioj.

Pintkonferenco de la Estonteco esploros manierojn fortigi la mastrumadon de tutmondaj publikaj bonoj, inkluzive de paco, tutmonda sano, enloĝebla planedo, kaj cifereca teknologio.

Due, nia Komuna Tagordo proponas novigitan socian kontrakton por la 21-a jarcento, ankritan de homaj rajtoj. Tio nepre inkluzivu universalan sanasekuron, enspezoprotekton, loĝadon, akcepteblan laboron, kaj aliron al edukado kaj trejnado.

Ĉio ĉi eblos senkonsidere pri la lando nur per Nova Tergloba Interkonsento garantianta, ke la evoluantaj landoj ricevu la subtenon kiun ili bezonas de la evoluantaj landoj kaj internaciaj financaj institucioj.

Trie, Nia Komuna Tagordo alportos fortan fokuson je faktoj kaj scienco. Mi restarigos Konsilantaron de Sciencistoj kaj starigos Laboratorion de UN pri Estonteco por fortigi la rolon de Unuiĝintaj Nacioj kiel fidinda fonto de dateno kaj atestaĵoj.

Kiel parton de la emfazo je faktoj, Nia Komuna Tagordo proponas, ke registaroj, informmedioj kaj reguligaj instancoj kune prilaboru normojn por honesteco en publika debatado.

Mallonge dirite, mensogoj ree fariĝu morale neakcepteblaj.

Kaj kvare, la Unuiĝintaj Nacioj de la estonteco estu pli inkluziva kaj pli retigita ol iam ajn antaŭe.

Kiam oni kreis Unuiĝintajn Naciojn, multflankismo signifis, ke registaroj kune laboru por komunaj celoj.

Hodiaŭ, la tutmondaj influantoj inkluzivas ankaŭ civilan socion, la privatan sektoron, urbojn kaj regionajn aŭtoritatojn, universitatojn, kaj pliajn instancojn.

Universitatoj posedas multajn solvojn kiujn ni bezonas. Ne nur klimatologoj kaj farmakologoj, sed sociologoj, juristoj, ekonomoj kaj fakuloj pri ĉiu disciplino esploras ideojn kiuj povas konduki al trarompoj por la komuna bono.

Multaj el la venontaj paŝoj en realigo de tiu ĉi ambicia tagordo troviĝas ĉe niaj Membraj Ŝtatoj. Kaj tiuj Membraj Ŝtatoj reprezentas vin.

Mi instigas ĉiujn personojn kiuj interesiĝas pri tiuj demandoj – jes, vere ĉiujn – ke ili diskonigu siajn vidpunktojn, per balotado kaj per civilsociaj organizoj, inkluzive de la tre aktivaj Asocioj pri Unuiĝintaj Nacioj tie ĉi en Kembriĝo kaj je la nacia nivelo en Britio.

Sinjorinoj kaj sinjoroj, karaj profesoroj kaj studentoj,

Valoroj, principoj, vero kaj honesto kuŝas kore de la liberala edukado kiun Kembriĝo proponas al la mondo jam okcent jarojn.

Sciencaj esploroj kaj tratanĉa teknologio nenion signifas sen ili.

Ni bezonas instituciojn dediĉitajn al lernado, ne al profitoj.

Al kritika pensado, ne al potenco;

Al vastigo de la limoj de homa kompreno;

Al eltrovo kaj miro;

Al faktoj kaj scienco.

Ni bezonas instituciojn similajn al Kembriĝo. Dankon.